

Decidoj de ISAE dum UK2015

Dum UK2015 en Lillo ISAE decidis pri ŝanĝoj en la organizo.

1 Situacio

1.1 La tendenco al malfermaj enhavoj

La koncepto de disponebligo de scienca kaj kultura enhavo kontraŭmembrotiza pago ne plu kongruos kun la estonta tempo. La tutmonda tendenco iras al konceptoj kiel Open Access, do *malferma aliro*. Tial ankaŭ ISAE devas pripensi kiel sinposicii en tia socio. La disponebligo papera daŭre gravas kaj daŭre gravos, ĉar la prezento surpapera bontipografia ankaŭ estontece estos kvalitindika. Samtempe nura disponebligo pagenda perdas la akcepton, speciale ĉe junaj agademaj homoj, kiuj deziras, ke iliaj kontribuoj estus utilaj por la tuta homaro kaj ne nur por la pagantaj membroj de asocio.

1.2 La trookupiĝo de la aktivuloj

Alia ŝanĝo, kiun eblas observi en la monda socio estas la multobligo de aktivebloj. Estas multe pli facile ekaktiviĝi pri interesaj aferoj. Tial aktivemaj homoj ofte ne aktivas nur por unu projekto aŭ asocio, sed por pluraj projektoj, kiuj por ili estas same aŭ simile gravaj. Eblas kritiki la malemon koncentriĝi pri unu specifa afero, sed aliflanke la diverseco de – speciale la Esperanta – kulturo gajnas, ju pli da aktivaĵoj ekkreskas, ju pli da novaj aferoj estas elprovataj.

En tiaj kondiĉoj certe suferas tradiciaj projektoj kiel *Scienca Revuo*. Do jen plia defio, kiun ISAE devas alfronti.

2 Solvoj

2.1 Membrotizoj

La estraro de ISAE dum UK 2015 en Lillo decidis disponebligi ĉiujn enhavojn de *Scienca Revuo* senpage laŭ krea komunaĵo (CC-BY-ND) tuj post la ties apero. Tiam ni perdas la kialon postuli memprotizojn, do la enspezoj de ISAE povas veni nur per donacoj kaj per vendo de la jara papera libro. Espereble estontece eblas malaltigi la pagojn al UEA kiuj necesas por havi la eblon publike kunsidi dum UK.

Do ekde la jaro 2016 la memprotizoj por ISAE estos nulaj. Ni tamen bonvenigas donacojn kaj ĝojas pri bona vendado de la jara libro.

2.2 Faciligo de kunlaborado

La defio de trookupiĝo de la aktivuloj sugestas el sia kialo jam eblan solvon. La fenomeno venas de la faciliĝo por aktivemaj homoj ekaktiviĝi por io. Do ISAE devas el tiu potencialo ĉerpi. ISAE devas faciligi la kunlaboradon por eblaj aktivuloj. Tio estas multe pli granda defio ol la financa. Ni devas doni al aktivemuloj la jenajn impresojn:

- ISAE estas vigla organizo, kiu regule faras ion interesan kaj valoran.
- Estas facile kaj inde kontribui al la agado de ISAE.

Ambaŭ estas defiaj. La unua estas defia, ĉar kutime daŭras tro longe ĝis nova eldono aperas. Tio bremsas la emon kontribui artikolojn. Dum UK en Lillo laĉiĝis la nova subretejo <http://aktuale.sciencia-revuo.info>. En ĝi ofte aperu novaj artikoloj individuaj, kiuj poste estu kompilataj el reta numero kaj pli poste al jara libro. La novaperintaj artikoloj povas esti komentataj per ĉiu, ĉu pri lingvaj, ĉu pli fakaj aferoj. Ankaŭ la dua punkto estas defia, pri tio sube.

3 Venontaj paŝoj

3.1 Aktuala kaj nova numeroj

Kvankam novaj ideoj eble estas eŭforiigaj, restas multe da pli rutina laboro por fari. Fakte la lasta numero de 2014 ankoraŭ atendas sian publikigon. Artikoloj por almenaŭ unu plia eldono atendas sian prilaboradon. Ankoraŭ mankas la decido ĉu tiuj novaj artikoloj jam aperu en <http://aktuale.sciencia-revuo.info> aŭ nur aperu en la tradicia vojo.

3.2 Disvastigo de la novaĵoj pri ISAE

La klopodoj de ISAE renovigi sin, devas rapidi esti disvastigata. Speciale al organizoj kiel la komisiono pri scienca kaj faka agado de TEJO ni devas prezenti nian novan agadformon, eble en la formo de tiu ĉi dokumento. En tiaj organizoj estas la homoj kapablaj kaj fake kaj teknike kontribui al la scienca agado de la Esperanto movado.

3.3 Pliefikigo de la teknikaj metodoj

Kvankam la elektronikaj metodoj jam faciligis publikigi tipografie altkvalitajn sciencajn artikolojn al tutmonda publiko, tia publikigo restas teknike postula procezo. Tial ISAE devas trovi kaj dokumenti laŭeble plej facilajn rimedojn. Por tio ĝis nun ekzistas nur lozaj ideoj. Do ĉi tie nur kelkaj frapvortoj.

- Ni volas eldoni niajn artikolojn kaj en tipografie altkvalitaj presebla formo, kaj en formo legeblaj en retaparatoj ĉu telefonoj, tabuloj, grandaj ekranoj, aŭ eĉ voĉlegiloj por blinduloj. Dezirindas havi aŭtomatan mehanismon, kiu kreas el unu artikola fonta dosiero plurajn formatojn, kaj PDF kaj HTML kaj EPUB.

- Bona bazo por krei plurajn legformatojn el unu fontdosiero estas *Markdown*. Ĝi difinas elementojn por strukturigi tekston. Bona realigo de la Markdown-sintakso estas **Pandoc**.
- La aŭtoroj laŭeble malpli ĝeniĝu per tiaj teknikaj demandoj, tial ni akceptu laŭeble plej multe da formatoj. Ankaŭ en tiu rilato Pandoc estas tre helpa, ĉar ĝi kapablas legi multajn diversajn formatojn.
- Por plifaciligi la redaktan laboron la aŭtoroj uzu laŭeble plej malmulte da formatindikoj. Ni publikigos artikolojn kun klarigoj, kiuj formatindikoj taŭgas.
- Ni bezonas trovi taŭgan formaton por bibliografio. Ankaŭ tion ni devas trakti en ekzempla artikolo.
- Bona, sed iomete malfacila maniero kune evoluigi ciferecan enhavon estas **git**. Tion povas uzi la teamo, kiu redaktas kaj provlegas.
- Ni verŝajne bezonos bonan retejan forumon por interŝanĝi spertojn. Kutimaj dissendolistoj estas tro malfacile traserĉeblaj. Sistemoj kiel **Discourse** draste plibonigas tion. Ili povas eĉ dum oni skribas demandon trovi malnovajn diskutojn pritemajn.
- La tipografie plej bona sistemo por sciencaj enhavoj estas LaTeX. Ĝi jam estas uzata de Scienca Revuo ekde 2012. Pandoc povas krei LaTeX-kodon.

Ĉiuj tiuj teknikaj rimedoj bezonas trejnadon kaj homojn scivolemajn. La jaro 2016 estos defia por ISAE kun la celo efektivi la transiron al moderna malferma kunlaborinstiga organizo.